


# Spirito Sankta, venu por

Alfred Conzeth kaj Richard Hoppe (1965) laŭ Michael Schirmer (1640)


melodio: Philipp Nicolai (1599)  
duvoĉa komponaĵo: Christoph Dalitz (2013)

tenoro



8 1. Spi - ri - tu Sank - ta ve - nu por /

baso



1. Spi - ri - tu Sank - ta, ve - nu




8 lo - ĝa - di nun en ni - a kor' / ho mon - tru Vi - an




por / lo - ĝa - di nun en ni - a kor' / ho mon -




8 ĝo - - - - jon! Kaj Vi - a he - - la bri -



tru Vi - an vo - jon! Kaj Vi - a he -



8 - - - lo nun / en ni e - fi - ku ki -



la bri - lo nun / en ni e - fi - ku



8 - el sun' / kaŭ - zan - te en ni ĝo - - - jon. Vo - jon /



ki - el sun' / kaŭ - zan - te en ni ĝo - jon!

Ĉi tiu verko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC-BY-SA). Tio signifas, ke estas permesite prezenti, multobligi, disvastigi aŭ registri la verkon senpage. Por la tuta teksto de tio permesilo, vidu jen: <http://creativecommons.org/licenses/by-4.0/deed.eo>

8      ĝo - jon / \_\_\_\_\_ se \_\_\_\_\_ ni glo - . . .

Vo - jon /      ĝo - jon /      vi ja ko - nas / kaj Vi do - nas / se ni glo -

8      ras / kaj el ko - . - ro Vin ad - o - ras.

ras /      kaj el ko - ro Vin ad - o - ras.

*ripetu ekde la signo laŭplaĉe*

2. Ho fonto, kiu verŝas sin / en piajn korojn ja sen fin' : /  
konsolon lasu aŭdi,  
por ke en sama fido ni / kun ĉiuj homoj tie ĉi /  
Vin ĉiam povu laŭdi.  
Aŭdi: / laŭdi / ni Vin volas. / [Vi konsolas /  
nin en sorto] / dum la vivo kaj en morto.
3. Nin ĉiam do konsilu nun / kaj Vi mem gvidu nin al sun' . /  
La vojon ni ne konas.  
Kaj persistecon donu Vi / por ke fidelaj restu ni. /  
Konsilon ni bezonas.  
Vidu, / gvidu. / [Vi instruas / kaj konstruas.] /  
Ni ĝin vidas / kaj al Vi ni ĉiam fidas.
4. Emfazon donu al la Vort' , / ke ĝi per la ĉiela fort' /  
en niaj koroj brilu,  
por ke per Via am-doktrin' / la tuta kristanaro sin /  
al Vi nun asimilu.  
Vorton, / forton / al ni donu, / [ke rekonu /  
ni la Kriston] / kiel la elaĉetiston.
5. Ho dolĉa roso, falu Vi / el la ĉielo super ni. /  
Briligu nian amon,  
ke ĉiam kun kompatu ni / kunulojn traktu kiel Vi. /  
Ni sentu Vian flamon.  
Flegu, / regu / [ne intrigo, sed instigo] /  
al la paco. / Benu nin per Via graco.

*La traduko estas elprenita de la kantlibro "Adoru" (IKUE & KELI, Ponto, 2001), No. 351.*

*Por la plej aktuala versio de ĉi tiu eldono aŭ por eldonoj en aliaj lingvoj, vidu:*

<http://music.dalitio.de/choir/dalitz/o-heilger-geist/>